ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO - FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang ★ Nr. 8 August 1952

DÜSSELDORF

FOKUSO DE ESPERANTISTA AKTIVECO EN 1952

La jubileo de SAT en Duseldorfo

Jus ni estis eltramiĝintaj ĉe „Ratinger Tor" kaj ekmarŝis al la Rejnhalo, la konkresejo de la 25-a SAT-kongreso de Esperanto. Antaŭ ni supreniĝis la strato al la granda Rejn-ponto, dekstre etendiĝis la belaj kaj ampleksaj ĝardenaĵoj de „Kortega gardeno". Jam montriĝis la iel ciklope impresanta konstruaĵo de l' kongresejo — jen ni jam povis ĝui simplan sed tipe Duseldorfan stratan sceneton: Kelkaj knaboj subite aperis antaŭ ni sur la trotuaro kaj faris radon, metante la manojn sur la teron kaj turnante la krurojn tra la aero. Ni havis antaŭ ni la famkonatajn „Düsseldorfer Radschläger", knaboj kiuj tiamaniere provas gajni kelkajn pfenigojn. Iu en sia trofavoro glitis kaj falis, kaj ĝuste al li mia akompananto donis kelkajn moneretojn, verŝajne por dolĉigi lian, cetere tre sensignifan, doloreton.

Larĝa ruĝa rubando kun blankaj literoj, kiuj tekstis ke ĉi tie okazas la 25-a kongreso de SAT, pendis super la enirpordoj. Jam antaŭ la stacidomo, sur tiu vigla multe trafikata placo, kie preskaŭ ĉiuj tramlinioj rendevuas, ni admiris du fierajn grandajn verdajn flagojn, kiuj gaje flirtis en la facila vento de la bela somera tago. Inter la du stelo-tukoj pendis granda blanka tolo kun jena saluto: „Bonvenon al la 25-a Esperanto-Kongreso de SAT kaj al la jarkunveno de GEA." Kaj — por tion jam nun diri — kiam, atendante en la vico por ricevi miajn kongresdokumentojn, mi povis ĵeti unuan rigardon en la salonegon de la Rejnhalo, mi ree vidis multajn flagojn; mi mencios ilin ankoraŭ.

Diligentaj manoj rapide elserĉis la koncernajn definitivajn kongreskartojn kaj ĉion kroman, i. a. la biletojn por loĝejo ktp., komunaj manĝoj, ekskursoj. Ne ĉiam estis facile tuj kontentigi ĉiun, tiel almenaŭ diris deĵorantoj. Tre multaj estis notintaj nenion sur siaj aliĝiloj. Sed kiel ĉiam, iel solviĝas ĉio.

Rapidan enrigardon ni faris en la kongresan poŝtejon, kie deĵoris malnova samideana ekspoŝtisto. Ankoraŭ ne ĉeestis tro multe da klientoj; sed tio baldaŭ radikale ŝanĝiĝis. Neniam oni povis trovi la ejeton malplena; ĉiu volis forsendi almenaŭ unu poŝtaĵon kun la bela kongresa stampo kaj kun la eĉ pli belaj poŝtmarkoj, ĉu tiuj kun Mona Lisa, ĉu kun Luther, ĉu kun Otto. Espereble ankaŭ per tiu poŝta stampo la intereso de la speciale filatela mondo estis altirata al nia afero.

Mi perdis subite mian amikon; nur poste mi eksciis, ke li foriris kun kamarado, por helpi lin transloĝiĝi.

La nunjara ĉefkunveno de GEA

Kiel estos?

Supozeble ne malmultaj el la membroj de GEA antaŭrigardis al la nunjara ĉefkunveno kun iom dubaj pensoj kaj sentoj. Dum la pasinta asocia jaro kolektiĝis amaso da materialo, kiu estis priparolenda, klarigenda kaj decidenda. (Nun, post kiam la sufikso „-end" estas definitive — aŭ nur provizore? — oficiala, oni ja rajtas ĝin laŭplaĉe aplikadi.) Ĉi tiu raporto tamen ne povas havi la taskon, doni kvazaŭ oficialan protokolon. Ĝi multe pli celas esti senĝena babilaĵo, kaj ĉar la lastjara pri Munkeno estis verkita en Germana lingvo kaj per tio kaŭzis ĉe kelkaj malkontenteton, nunjare ĝi estu Esperantlingva; sed eble ankaŭ tio kaŭzos malkontenteton sur la alia flanko. Sed ni diru „maalés!" kun la araboj kaj iomete esploru la kesteton de niaj rememoroj.

Kongreseto

Kiel jam lastjare, ankaŭ en 1952 la Germana Kongreso okazis, por tiel diri, en la ombro de alia pli granda kaj grava. La Universala de Munkeno preskaŭ malaperigis sian Germanan frateton, kaj ankaŭ la Jubilea de SAT kompreneble multe pli altiris la atenton. Modeste aperis ĉe la vosto de sia grava antaŭulo la „Cefa jarkunveno de GEA", la sesa post Frankfurt, München, Göttingen, Mainz kaj ree München. Tamen ankaŭ ĝi estis bonvenigata sur la granda blanka tol-afiŝo antaŭ la Duseldorfa stacidomo, kiu pendis inter la du grandaj flirtantaj flagoj en la koloro de l' espero kaj kun la signo de l' espero.

La kongresejo

Kongresejo estis „Haus der Altstadt", vasta konstruaĵo kun taŭgaj ĉambroj kaj salon(et)oj; sed mi aŭdis oftete, ke ĝi impresis iom mallume kaj malhele. Dank' al Dio tio ne influis la ĝeneralan spiritostaton de la kongreso, kiu — jam nun mi diru tion — estis ĉiam tendenca al bonvolo kaj konkordemo.

La kongresurbo

Sed ĉu ni ne diru unue kelkajn vortojn pri la kongresurbo? Duseldorfo (konata samideanino diris al mi, ke ŝi neniam uzus ĉi tiun formon, kaj mi demandis ŝin, kial ŝi tamen uzas „Munkeno"?), do Duseldorfo estas ĉefurbo de unu el la plej gravaj, konataj kaj ankaŭ plej riĉaj landoj de la Germana Federacia Respubliko, nome de Rejnlando-Vestfalio. Ĝi estas vera grandurbo, impona, eleganta, plena de parkaĵoj kaj ĝardenaĵoj, kaj ke la Ko-

WK/108/1/72



„Ehrenhof" (Ĥonora korto)
konstruita en 1924—1926 de Prof. W. Kreis. Ĝi estas la „muzea insulo" de la urbo Duseldorfo, kie troviĝas la urbaj artkolektoj (centrajgalerio, artindustria muzeo kun plastikaĵoj, kolekto da keramikaĵoj kaj kuprogravur-kabineto)
Foto: Dolf Siebert, Düsseldorf

Ĉar tiu unue loĝis en tiel nomata bunkro-hotelo, sed tie ne plaĉis al li, ĉar en tiu „ĉambro" (pli ĝuste oni diris „kabineto") estis nek ŝranko nek akvo, kaj tamen la prezo estis rimarkinde alta, ne tre ŝatata fenomeno cetere en la tuta urbo Duseldorfo kaj precipe malagrabla al la malabunda monujo de laboristo-esperantisto.

Tro rapide alvenis la horo de la Interkonatiĝ-vespero. En la vasta halo tute ronda, simila preskaŭ al templa interno, elektraj lampegoj de supre pendantaj ĵetis disen siajn lumfaskojn. Rapide pleniĝis la sidlokoj ĉirkaŭ la blanke kovritaj tabloj. Voĉobruado, parolsusurado. Tamen ankoraŭ io mankas. Kio, kio? Ha, kompreneble, muziko! Kaj jen sciigas kamarado Pillekamp, la tre lerta kaj ĉiam freŝa prezidanto de OKK, ke ne estos, laŭ la deziroj de aro da kongresanoj, kiuj opiniis ke sen muziko la interkonatiĝo pli bone prosperos. Nu, ni vidos. Provizore la programo ne estas tre impona: kantado de junula ĥoro, rakontado de anekdotoj kaj ŝercoj; aperas ankaŭ Sinjo, la knabina propagandistino, kun akordeono kaj ludas koncertan valson, belan prezentaĵon. Sed kial ŝi sidis tiel kaŝite malantaŭ la preleg-pupitro? Fine kantis ankaŭ franca kamaradino en lerta maniero; sed laŭ mi ĝuste ŝiaj kantoj nepre postulis ian muzikan akompanon. La demandosigno post la vorto „fino" en la provizora programo verŝajne ne havis grandan signifon tiusencan, ke oni supozeble malfrue (aŭ frue) enlitiĝos.

Por la malferma kunsido ree en la Rejnhalo. La tuta kongresanaro kunestas, kuŝas preskaŭ streĉa atendo en la iom sever-aspekta ejo, kiun kovras kupolo. La severeco estas mildigita per la kolormulteco de la diversaj flagoj pendantaj de ĉirkaŭa galerio. Estas, kiel mi ekscias, la flagoj de la ŝtatoj de la germana federacia respubliko, kies koloroj nigra-ruĝa-ora pendas super la estrado apud la ruĝaj flagoj socialistaj kun la verda Esperanto-stelo. La fono de la estrado estas plenigita de abundo da malhelverdaj laŭrokreskaĵoj. De meze supre salutas superdimensia SAT-insigno.

Ĉe kreskanta voĉobruo eksonas la marŝo de Verdi el „Aida". Mia tablo, unue nur malmulte ĉesidata, nun estas ekokupata de grupo da francaj gekamaradoj, sed bedaŭrinde ili ne trovas ĉiuj lokon, kaj do vole-nevole devas disiĝi. Kial, cetere, ankaŭ en SAT-kongresoj samnacianoj celas sidi kune? La francoj apud mi viglege interbabilas, kun sia ĉarma sed kelkfoje iomete tro akra franca akcento.

Intertempe alvenis la estraranoj kun invititaj gastoj. K-do Pillekamp ĉe la mikrofono. Supreniras la estradon ĥoro el infanoj kaj plenkreskuloj, kaj arte kaj potence eksonas „Mondopaco" de Hartleben, tradukita de Bartelmes. „Al popoloj paco brilu, Pac' al ĉiu homa kor'!"

En bela germanlingva parolado la ĉefurbestro de Duseldorfo montras sian komprenon por nia ideo: „Friede ist da, wo man sich erkennt und versteht" (paco estas tie, kie oni sin ekkonas kaj komprenas reciproke). La paroladon tradukas koncize germanen lonjanoj ridetas iomete moke aŭ eĉ malŝate, kiam ĝi nomas sin „filino de Eŭropo"... nu, tio ne gravas. De ĉiam regis ia rivaleteco inter la du Rejnaj metropoloj, el kiu unu fakte (laŭ la aserto de la Kolonjanoj) ja estas nur iu „Dorf" apud iu tute sensignifa rivereteto. Interne ankaŭ la Kolonjanoj estas fieraj, kiam ili promenadas sur la eleganta „Kö" (Königsallee = reĝa aleo, pri kiu la bildo sur paĝo 81 de EP donis nur palan imagon) aŭ sidas antaŭ kafejo sur Graf-Adolf-Platz aŭ sur benko en la ampleksa kaj vere bela „Hofgarten" (kortega ĝardeno) aŭ, ĝuante la Rejn-riveregan panoramon, marŝetas sur la larĝaj kaj arboriĉaj bordostratoj.

„Salitaj prezoj"

Ke Duseldorfo ne estas simpla urbo, tion oni ankaŭ ekkonas laŭ la hotelaj prezoj. Bedaŭrinde ili ŝajnis al multaj ne tre malaltaj (mi volas esprimi min singarde), sed mi devas konfesi, ke ankaŭ aliloke ili estas iomete salitaj. Neniel oni rajtas supozi, ke la hotelestroj ktp. faris tion por malkomplezi la Esperantistojn, male, mi aŭdis ke la ĉefurbestro Gockeln faris bonegan festparoladon ĉe la SAT-kongreso kaj tiam esprimis sian tutan simpation al nia afero.

Bier- kaj manĝejo „Füchschen"

Eble mi diru ankoraŭ kelkajn vortojn pri la manĝado. Kiel mi konstatis, multaj el la partoprenintoj de l' SAT-kongreso tagmanĝis en „Füchschen", tute proksime al „Ratinger Tor", kaj la menuoj tie estis kaj sufiĉaj kaj moderprezaj kaj bongustaj. En ĝia korteto staris krome aro da tabloj sub libera ĉielo aŭ sub ŝirmtegmentoj, kaj tiu korteto prezentis kun siaj sunŝirmiloj kaj grimpkreskaĵoj preskaŭ sudlandan aspekton, precipe tiam, kiam ĝi, kiel dum la SAT-kongreso, estis plena de gajaj voĉoj kaj belaj knabinoj eksterlandaj, kompreneble nur Esperantistaj.

Komplika balotsistemo

Sed mi eble jam tro multe babilas pri nekongresaj aferoj. Do: la unua serioza kunsido estis tiu de la pli vasta estraro vendredon la 8an de Aŭgusto kaj ankaŭ sabaton antaŭtagmeze. Interalie oni tie fiksis la metodon de la voĉdonado, kiu posttagmeze sekvigis la kontroladon de la voĉdoniloj, procedo ne tre simpla nek tre rapida. Ŝajnas al mi, ke la balotmaniero unue devas esti pli malkomplikita kaj due preparita jam antaŭ la jarkunveno. Kaj ĝi devus malebligi ankaŭ, ke senlima nombro da voĉoj povas kolektiĝi en unu mano. Tio estas ioma moko pri la demokrata decidprincipo.

Eŭropo vokas

La fakan kunsidon de la Eŭropa Unio mi bedaŭrinde povis aŭskulti nur je ĝia fino. Estas ĉiam ĝuo ĉeesti paroladon elstaran same lingve kiel enhave de prof. L. Laurat.

Bona transiro al Interkonatiĝa Vespero

La unua parto de la jara ĉefkunveno, komenciĝanta sabaton posttagmeze, tre detale pritraktis la raportojn kaj finiĝis per voĉdonado pri la malŝarĝo de la administracia estraro kaj de la kasrevizoroj. La malŝarĝo okazis per sufiĉanta plimulto da voĉoj. La ĝisnuna prezidanto D-ro S. Ziegler estis reelektata kaj oni aprobis, ke li proponu la membrojn de la nova administracia estraro. Tio estis jam tre bona rezulto de la kunveno kaj certe havis bonan influon sur la humoron en la vespera interkonatiĝa vespero. Bedaŭrinde mi venis tro malfrue kaj do povis partopreni nur ĝian lastan fazon. Tamen la tempo sufiĉis ankoraŭ por kelkaj dancetoj, kaj por aŭskulti kelkajn bonajn deklamojn de prof. Laurat.

En S-ta Andreo

En la preĝejo de S-ta Andreo okazis dimanĉon matene katolika diservo, dum kiu predikis pastro Wachowsky el Bonn, malnova kaj jam maljuna samideano. Li belesprime klarigis la signifon de la parolo, de la Verbo kaj de la familio, vorto devenanta de la latina fabulari = paroli. La preĝejo estis plena de Esperantistoj, kiuj sindone aŭskultis la elokventajn frazojn de la honorinda pastro.

La nova registaro

Baldaŭ poste okazis la dua parto de la jara ĉefkunveno, kies unua faro estis la konfirmo de la estraranoj, kiujn la nova-malnova prezidanto proponis. La de nun „reganta" plej alta instanco de GEA konsistas do el (alfabete) samideanoj Berger, D-ro Bormann, Jolliet,

k-do v. Beesten. Poste k-do Bartelmes en sia trankvila maniero respondas unue germane, sed baldaŭ ree aplikas Esperanton, aludante ke li devas de sia sidloko ĉiam rigardi al surmura teksto diranta „Esperanto — nia dua lingvo", sed ke tio, almenaŭ por li, ne ĝustas. Esperanto estas lia unua lingvo, la lingvo de supernacia sentado, per kiu nur ebliĝas sennacieca movado. Kiel ĉiam lia parolado estis ĝuo por oreloj kaj cerbo.

Sekvas la salutoj de reprezentantoj nederlanda, sveda, pola, hispana, brita, dana, germana, belga, usona, franca, luksemburga kaj sarlanda. Oni diris al mi, ke estas 14 nacioj reprezentitaj, sed mi ne notis aliaja; verŝajne mi ne bone notis ĉiujn.

Estis nun donataj informoj pri diversaj kunsidoj kaj elektataj la prezidantoj. Interesa speciale estis la sciigo de k-do Gahler el Glinde apud Hamburg, ke tie oni antaŭ nelonge nomis vojon „Esperantoweg".

Per la komuna kanto „Fratoj, al sun', libereco!" finiĝas la malferno de la jubilea kongreso de SAT.

Je la posttagmezo de la malferma dimanĉo okazis ekskurso al la urbeto kaj kastelo Burg en la „montetara lando". Je la dua jam staris aŭtobusduo antaŭ la akceptejo. Tuj ĝi estis okupata; baldaŭ poste alvenis la dua aŭtobus-paro; tuj estis okupata ankaŭ ĝi. Ankoraŭ staris homoj atendantaj. Do fine la aranĝintaj OKK-anoj sukcesis alvenigi ankoraŭ trian aŭtobus-duon; tiel ses veturiloj plenaj de gajaj SAT-anoj kaj SATaninoj fine forveturis dum brila somervetero, unue sur la „Autoba(h)n-ejo", vortludeto kiu multe plaĉis al kelkaj eksterlandaj kunveturantoj. La unua halto okazis sub „Müngstener ponto", la plej alta fervoja ponto de Germanio (alteco 107 m super la rivernivelo). De tie al Burg, kie nove instalita lifto al la kastelo forte altiris la atenton kaj estis tiel „sieĝata", ke verŝajne ne ĉiuj ekskursanoj en la longa vicego povis, ĝis la forveturo, esti suprenlevataj kaj ree malsuprenŝvebi. La aliaj malstreĉe promenetis tra la malmultaj stratetoj aŭ ie trinkis kafon.

Vere oni devis miri, ke kaj kiel la multegaj automobiloj ĉiuspecaj, motorbicikloj, bicikloj kaj piedirantoj (ankaŭ tiaj ankoraŭ ekzistas!) povis trovi vojon kaj spacon unu apud la alia. Sed ĉio bone funkciis, kaj iom lacaj kaj iom malsataj ni ree alvenis antaŭ la Rejnhalo. Kvankam estis jam fuŝĉe malfrue, la preleganto de tiu vespero, k-do Waringhien, atendigis nin ankoraŭ, ĝis fine li faris sian prelegon kun la certe ne ĉiutaga temo: „Kion nekredanto povas lerni el la Biblio." Ĝi estis sprita, interesa, sed kelkloke iom tro detala kaj ne tiel efikis je la ĉeestantoj, kiuj grandparte estis lacaj pro la ekskurso. Iu diris al mi, ke ĝi estis la Biblio nebiblie prezentita.

La prelegoj de la postaj tagoj (de k-do Laurat pri la Schuman-plano kaj de k-do Marc Starr, Usono, pri la Marshall-plano) estigis ampleksan diskutadon, kiu tamen ĉiam estis tre objektiva, kvankam ofte sprite opozicia kaj spicita per kelkaj malĉetoj, precipe flanke de francaj kamaradoj. La prelegoj per si mem estis vere bonaj kaj profundaj.

Bedaŭrinde mi ne povis partopreni la tutan kongreson. Speciale mi bedaŭris tion pro la ŝipekskurso. Sed poste mi aŭdis de partoprenintoj, ke ĝi estis tro longa, ke pro la malalta nivelo de l' Rejno la ŝipo devis tre malrapide veturi kaj ke ĉe la celo Königswinter oni eĉ ne havis tempon por supreniri la famkonatan rokmonton „Drachenfels" (drakroko). Aliflanke la tuta ŝipo estis je la dispono de la ekskursanaro, kaj oni povis laŭvole danci, kanti, petoli ktp.

Pri la laborkunsidoj mi ne volas paroli ĉi tie; ĉion koncernan oni trovos en „Sennaciulo". Mia sola celo estis nur, provi revivigi en la spiritoj de la ĉeestintoj la belan jubilean kongreson de SAT kaj doni palan ideon al la neĉeestintoj. Kun speciala ĝojo mi notas la interkonatiĝon kun hispan-nederlanda-Esperanta geedza paro, kun kiu mi loĝis en la sama loĝejo, cetere la loĝejo de Duseldorfa samideano, kiu, kvankam li neniam estis nomata dum la kongreso, portis sian grandan parton de respondeco precipe pri la financa flanko de la kongresaranĝoj.

Mi ripetas, ke mi neeble povas mencii ĉion; sed ne preterlasi tamen mi volas la diversajn vizitojn al kooperativaj entreprenoj. Kun trideko da gekamaradoj mi estis en viandaĵfabriko kaj konstatis tie ne nur la modelan teknikan, sed ankaŭ la modelan socialan aranĝon.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Anglio en kampara bieno proksime de Sefildo (Sheffield).

Rejnlanda SATano.

Klünder, Leubner, Morawec, Uhde, Wagner kaj D-ro Ziegler. Estas tri pli ol antaŭe kaj mankas s-ro Hübner. Sed li estis elektata en komisionon, kiu havas la taskon ankoraŭ unu fojon detale pristudi la problemon de asocia organo, eble kreota per kunigo de almenaŭ du el la nun ekzistantaj Germanaj Esperanto-gazetoj. Vi scias, ke ĉi tiu demando jam troviĝis sur la tagordo de la Munkena jarkunveno kaj estis tiam transdonita al la estraro por ĝin solvi. Sed ĝi ne sukcesis. Espereble sukcesos ĉi tiun fojon la komisiono, ĉar temas ja pri unu el la plej gravaj problemoj de la asocio: proksimume 3/4 de ĉiuj enspezoj estas bezonataj por la asocia organo, kaj se oni povus atingi, ke tiu ĉi procentaĵo malaltiĝus eble al 50 % kaj krome la organo estus eĉ pli ampleksa kaj do pli multenhava kaj varia... ĉu tio ne estus konsiderinda gajno por la asocio?

Prudento regas

La multaj aliaj proponoj trovis relative kontentigan kaj rapidan solvon, dank' al la komprenema kaj prudenta sinteno de la kunveninta ro.

Fakaj kunsidoj

Kio restis krome? La tagmanĝo. Post ĝi: fakaj kunsidoj, nome la gepatra, la instruista. De la lasta mi povis ĉeesti kun mia edzino ankoraŭ parteton, kaj mi bedaŭras, ke tio ne estis ebla ankaŭ rilate al la gepatra; sed finfine oni ja ne povas sinsekve dum du tagoj sidi en ĉambroj kaj enspiri gastejan aeron. Estante en Duseldorfo, oni ja devas minimume unu fojon promeni sur la „reĝa aleo".

La konata „arĝenta strio"

Malfrua posttagmeza horo ankoraŭ vokis al estrarkunsido, la unua en la nova ofica jaro. Laŭ ĉiuj aspektoj la estonta agad-periodo promesas fariĝi prospera kaj vere harmonia, ĉar — kaj tio ŝajnas al mi esti la plej bela rezulto de la nunjara ĉefkunveno aŭ almenaŭ de apartaj traktadoj kaj konferencoj en ĝia kadro — la nigraj nuboj kiuj komence pendis super la kongreso kaj al multaj inspiris sekretan timon, tiu inkubo ŝajnas esti definitive for por cedi la lokon al estonta komuna laboro.

Fino bona, ĉio bona

Cu la solena fermo laŭ la programo okazis, mi ne scias; mi kredas ke ne, ĉar je vesperiĝo la kongresejo jam estis preskaŭ sen kongresanoj. Tamen, mi ne scias. Eble ili grandparte ekskursis kaj revenis. Mi devis fari viziton en la urbo, perdis multe da tempo per tramveturado kaj fine alvenis ĉe la stacidomo, kiam mia vagonaro ĵus estis forveturinta. Sekvo: Tuthora atendado, do horo perdita, poste je noktomezo malfruiĝinta alveno en la katedralurbo kaj hejme. Do, laŭ ĝenerala opinio mi ne povis diri: fino bona, ĉio bona. Sed tamen mi forlasis Duseldorfon tre kontenta kun la konvinko, ke en ĝi komenciĝis epoko de harmonia prospereco por nia asocio.

Karaj EP-gelegantoj, tio kompreneble ne estis raporto, sed nur personaj impresoj. La oficialajn komunikojn ni legos en la venonta numero de LA PONTO.

J. Berger



Kastelo de Benrath apud Düsseldorf

La kastelo estas unu el la plej puraj rokoko-konstruaĵoj en Okcidenta Germanujo. Konstruis ĝin sub la regado de la elektoprinco Karlo Teodoro la arkitekto Nicola de Pigage en la jaroj 1755—1775

Foto: C. Halbach, Ratingen

LA 37a UNIVERSALA EN OSLO

Unuafoje en la historio de Esperanto la ĉefurbo norvega estas la renkontejo de la tutmonda esperantistaro. Pli ol 1600 personoj estas kunvenintaj el 35 landoj por manifestacii la forton kaj universalecon de nia movado.

Ekster la Universitato flirtas la verdstela standardo atentiganta pri tio ke jen estas la kongresa centro. Ankaŭ aliloke en la urbo la standardo de l' espero atestas pri la ĉeesto de la esperanta popolo.

Jam vendredon alvenis la unuaj gekongresanoj kaj ĉe la stacidomo ili estis akceptataj de lokaj komitatanoj kiuj estis je ilia dispono, helpante kaj konsilante. Granda verda flago pendis bonvenige en okultrafa loko, kaj oni tuj eksentis iom de la kongresa atmosfero.

Samtage malfermiĝis la akceptejo de la kongresejo, kaj okazis la unuaj kunvenoj de la estraro de UEA.

Sabaton estis malfermata la kongresejo, kaj la gekongresanoj komencis alflui pli grandnombre. Baldaŭ regis la kutima vigla, zumanta vivo kiun ĉiu kongresinto tiel bone konas, sed kiun oni tiel volonte ree kaj ree travivas. Aŭdiĝis alvokoj, kruciĝis en la aero salutvortoj, tranĉis la aeron la ĝojkrietoj, kiam iu aŭ alia revidis dumlonge ne viditan amikon aŭ amikinon. Estis la Esperanta animagordo en plena disvolviĝo.

„Vin mi ja vidis antaŭe, ĉu ne estis en Bornmuto en 1939? Aŭ eble en Parizo en 1950? Ĉu vi ne memoras...?" Blonda nordulo renkontas sian pli malhelhaŭtan amikinon, kaj ĉarma reprezentantino de Italujo sian amikon el Danlando. Regas revida ĝojo kaj koraj sentoj.

La bildo en kaj ekster la kongresejo konstante iĝas pli vigla kaj kolora. Jen aperas hindoĉinino en sia pompa hejmlanda kostumo, jen svedino en la belkolora vesto de ŝia loĝregiono. Tia estas la preludo de la kongresa semajno kiu kunigos la geesperantistojn en laboro kaj festo.

La interkonatiĝa vespero

havis lokon sabate en la Domo de la Inĝenieroj. Kvankam estis disponigita areto da salonoj kaj ĉambroj por la kunvenantoj, tamen la spaco estis nesufiĉa. Kiam estis la tempo de la komenciĝo, ĉiuj ejoj estis plenplenaj de gajaj verdstelanoj ĝuantaj la harmonian atmosferon kaj la multkoloran vivon regantan. Renoviĝis memoroj de kongresoj antaŭaj, ligiĝis novaj kontaktoj. Ĉiudirekte zumadis gaja babilado kaj kora ridado. Oni facile interkoniĝis, kaj kiam post la noktomezo oni disiĝis por iri dormi, oni kunportis belajn kaj valorajn memorojn.

Dimanĉo, la tago de la oficiala malfermo, komenciĝis per du diservoj. Unue la katolikoj je la 9a horo kolektiĝis en la preĝejo S-ta Olavo, por komune preĝi kaj aŭskulti prelegon pri la universaleco de la katolika eklezio el la buŝo de la germana pastro Thalmaier, post bondeziraj vortoj de lia episkopa moŝto en Oslo, d-ro Jacobus Mangers. Unu horon poste la protestantaj kongresanoj plenigis ĉiujn sid- kaj starlokojn de la apuda preĝejo Trefoldighet (S-ta Triunuo). La predikaj vortoj de la blinda pastro Overvoll el Oslo vere ĝis korprofundo penetris al ĉiuj aŭskultintoj: ne la lingvo sola povas interfratigi homojn, sed la koroj decidas. Kaj la fina himno vortigis ĉies pensojn: „Dankata estu Di'..."

Por la oficiala fotografiĝo bonŝance la suno sendis kelkajn radiojn al Bislett-stadiono, kie du lertaj fotografistoj klopodegis oportune starigi pli ol mil homojn — du hundoj certe pli rapide sukcesus ordigi samnombran ŝafaron — kaj post tuta horo la unuaj pluveroj diskurigis ĉiujn, ĉu al manĝejo, ĉu jam al la ejo de la sekva kongresprogramero.

La solena inaŭguro

okazis ĉi-foje en la posttagmezo kaj ne kiel planite en la Urbdomo, sed en la impona kinejo Colloseum. Kiam estis fermitaj la pordoj kaj la eminenta angla pianisto, s-ano Frank Merrick, komencis ludi la faman Polonezon en A de Chopin, ĉiuj sidlokoj en la salonego estis okupitaj. Regis ĉiujn soleno. Perceptebla estis tiu nedifinebla atmosfero kiu ĉiam plenigas la inaŭguron de Esperanta kongreso.

La fonon kovris la giganta standardo kiu jam havis lokon en vico de kongresoj. La scenejo estis ornamita per abundo da belaj floroj kio pliigis la impreson de soleno.

Jen venas sur la podion la eminentularo kaj la diverslandaj reprezentantoj kaj salutontoj. Ĉies rigardoj direktiĝas al la scenejo. Alparolas la grandan ĉeestantaron en Esperanto la estro de Oslo, sinjoro Brynjulf Bull. Grandan aplaŭdon vekas liaj belaj kaj kuraĝaj vortoj.

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Estas por mi granda ĝojo ke mi, en la nomo de la urbo Oslo, povas saluti al la partoprenantoj en la Esperanto-kongreso: koran bonvenon al Oslo.

En la multvaria kaj konfuza mondo, en kiu ni vivas, la diverseco de la lingvaj esprimformoj estas unu el la plej grandaj problemoj, kiujn ni devas venki. La lingva diverseco ne nur malfaciligas la kontakton inter la homoj, sed malhelpas la personan kontakton efektivigeblan per interparoloj en lingvo, kies nuancojn ĉiuj regas.

Tial estas tute nature ke la homoj dum longaj tempoj okupiĝis pri la penso pri mondlingvo, kiun ĉiuj povus kompreni kaj regi. Estas nature ankaŭ ke ĉi tiun penson oni klopodis solvi per lingvo logike konstruita, simpla en sia gramatiko, kaj tial relative facile lernebla. Estas kompreneble ankaŭ ke ĉi tiun lingvon oni klopodis konstrui el elementoj de ĉiuj ekzistantaj lingvoj en la mondo.

Mi deziras danki al la multaj virinoj kaj viroj, kiuj dum la jaroj entuziasme laboradis por efektivigi ĉi tiun penson. Malantaŭ ĉi tiu penso kuŝas deziro atingi tion, al kio ni ĉiuj strebas: komprenon, amikecon, kaj pacon inter la popoloj. Estas mia espero ke ĉi tiu laboro ĉiam estu daŭrigata, tiel ke ĉi tiu movado, kune kun la aliaj internaciaj movadoj strebantaj al la sama celo, rezultigu novan kaj pli bonan mondon.

Mi esperas ke ĉiuj, kiuj alvenis al ĉi tiu mondkongreso, travivu agrablan tempon en nia urbo, ke ili bone fartu ĉi tie, renkontu komprenon kaj amikojn kaj ricevu la impreson ke oni ĉi tie estas kaptitaj de la sama intereso kaj interesiĝas pri la sama celo, al kiu vi laboradas. Mi esperas ankaŭ ke la nun malfermata kongreso estu fruktodona por via laboro.

Denove mi deziras al vi ĉiuj: koran bonvenon al Oslo.

Post malsano grava ree prezidas la kunvenon nia ŝatata prezidanto Ernfried Malmgren. Varmaj kaj sentoplenaj estas la vortoj per kiuj li salutas la kongresanaron. Li skize menciis la hodiaŭan amplekson kaj multflankecon de nia movado, admonante al la gekongresanoj imiti la ekzemplom de nia majstro Zamenhof, kiu ĉiam kaj ĉiel laboris por realigi sian belan ideon pri interkompreno kaj interfratiĝo inter la homoj.

Ĉar estis la 80a naskiĝtaga datreveno de la norvega reĝo, la prezidanto proponis, kvankam ne estas kutimo ke esperantista kongreso sendas saluton al ŝtatestro, saluti la altŝatatan reĝan moŝton Haakon VII nome de la tuta kongresanaro. La propono estis aklame akceptata. La saluto estu esprimo de la simpatio kaj estimo, kiun oni sentas al la reĝo kaj al la norvega popolo.

S-ro Malmgren finis la kuraĝigan paroladeton citante la konatajn vortojn de la norvega verkisto Henrik Ibsen el la libro „Peer Gynt": ... „Estu vi mem!" Estu ni esperantistoj ni mem! Ni fosu nian sulkon! Ni daŭrigu la belan laboron konstrui ponton inter la popoloj! — Forta aplaŭdo sekvis la saluton de la prezidanto.

La sekvanta paroladanto estis la prezidanto de LKK, C. Støp-Bowitz, kiu tutkore bonvenigis la kongresanaron al la lando, al la urbo Oslo kaj antaŭ ĉio al la 37a Kongreso de Esperanto.

Kvankam malgranda ero en la historio estas nia kongreso, tamen tiu fakto ke ĝi estas la unua pli grandskala en nia lando sen lingvaj malfacilaĵoj donas al ĝi apartan gravecon. Li finis esprimante la plej bonajn dezirojn por la kongreso.

Nun la parolo estis transdonata al la norvega ministro de eduko kaj eklezio Lars Moen kiu nome de la norvega registaro bonvenigis la kongresanaron al Norvegujo.

La norvega ministro de eklezio kaj edukado, Lars Moen:

En la nomo de la norvega registaro mi havas la honoron prezenti saluton al la 37a Universala Esperanto-kongreso.

Estas forta, mondampleksa organizo, kiu kunvenas por kongreso tie ĉi. La impona nombro da partoprenantoj kaj la nombro da landoj, el kiuj la partoprenantoj venas, rakontas pri tio. Kaj estas grandaj interesoj, kiuj ligiĝas al la programo kaj la taskoj por kiuj la organizo laboras.

La interligo kaj kunlaboro trans la limoj, kiuj pli aŭ malpli nature estas lokitaj inter diversaj landoj kaj diversaj popoloj, iĝas pli kaj pli decidaj por la materia kaj kultura evoluo en la lando. Restos ĉiam malpli da aferoj, kiuj estas naciaj en la signifo ke ili nur koncernas la propran landon kaj popolon. La koncepto „Unu mondo" ricevas pli kaj pli grandan realecon. Malgraŭ tendencoj al izolado kaj malgraŭ baroj de multaj specoj la evolutendenco tamen estas en tiu direkto. Ĉar estas fortaj kaj bonaj potencoj kiuj laboras por tio. Kaj inter ili estas Universala Esperanto-Asocio.

Unu el la grandaj malhelpoj en internaciaj interrilatoj estas ke homoj de unu popolo en malgranda grado komprenas la lingvojn de aliaj popoloj. Tiun problemon la esperantistoj volas solvi per enkondukado de nova lingvo, unu m o n d o - lingvo flanke de la n a c i a j lingvoj, lingvo kiu estas neŭtrala kaj ne kreas rivaladon kaj prestiĝan batalon inter la lingvoj, kiuj hodiaŭ estas uzataj de la grandaj homgrupoj.

Oni emfazas, ke Esperanto ne plu estas nur projekto, ĝi estas preta lingvo, kiu estas sukcese provita, kaj ĝi montris ke ĝi havas la kapablon solvi la taskojn, kiujn oni povas doni al ĝi, ke ĝi estas uzebla en poezio, en scienco kaj arto, en religio kaj politiko.

En la generacio, kiu pasis post kiam Esperanto estis prezentata kiel la „monda helplingvo", fervoraj kaj saĝaj kaj kredantaj esperantistoj laboris por la ideo kaj la programo en maniero, kiu estas treege respektinda.

Mi supozas ke estas ankoraŭ malproksima la tago, kiam oni povos diri ke la programo estas realigita. Sed la aliĝo, kiun havas la ideo hodiaŭ, kaj kiu i. a. montras sin en la aliĝo al tiu ĉi kongreso, donas bazon por granda optimismo.

Mi prezentas dankon al la esperantistoj pro la kontribuo al la paco kaj kulturo, kiun ili faris kaj faras, pro la bona ekzemplo, kiun ili montras de tio, ke homoj kun diversaj opinioj pri religiaj, politikaj kaj aliaj disputataj demandoj, povas kunlabori pri pozitivaj entreprenoj por la komuna bono. Kaj mi deziras al la kongreso fortojn kaj laborkondiĉojn por realigi la grandegan laborprogramon, kiun oni starigis, kaj ke la partoprenantoj krome havos tempon kaj okazon rigardi ankaŭ ion el tio, kion nia lando kaj tiu ĉi urbo povas prezenti, antaŭ ol ili hejmeniros, ĉiu al sia lando.

Venis la parolvico al la multaj reprezentantoj de registaroj kaj landaj Esperanto-Asocioj, kiuj ĉiuj transdonis plej korajn salutojn kaj bondezirojn. Jen la longa listo.

Sian registaron reprezentis: Frank Halls (Aŭstralio), ĝen. konsulo Örvig (Aŭstrujo), f-ino Obozinski (Belgujo), Pierre Petit (Francujo), Zaimal Arifin Samil (Indonezio), Siegfried Ziegler (Germanujo), I. R. G. Isbrucker (Nederlando), Karl Söderberg (Svedujo), E. de Haller (Svisujo), E. Malo de Souza (Brazilo), E. Thawley (Nov-Zelando).

La kongreson salutis jenaj landaj asocioj: Argentino, Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo (reĝa belga kaj flandra), Britujo, Danujo, Francujo, Italujo, Jugoslavujo (invitante al la 38a UK), Nederlando, Norvegujo, Nov-Zelando, Svedlando, Svisujo, Nordameriko, Finnlando, Germanujo, Indonezio, Irlando, Israelo, Maroko, Japanujo.

Per brila festparolado ĝuigis prof. d-ro Ivo L a p e n n a la aŭskultantaron. Li enkonduke laŭdis la norvegan popolon kaj cetere la tutan Nordon pro ĝia granda laboro por kulturaj celoj kaj pro la ekzemplo kiun ili montras, kiam temas pri solvo de problemoj interlandaj.

En sia parolado li akcentis la kulturan flankon de la Esperanta movado. Nia 37a kongreso estas nova pruvo pri tio, ke la lingvo Esperanto brile taŭgas sur kiu ajn kampo de la homa vivo.

La homoj en la antikva Grekujo, diris la parolanto i. a., konkursis ne nur pri korpaj kapabloj, sed eĉ pligrade ili priatentis la artajn kaj intelektajn kapablojn. Al la Olimpiaj ludoj en Finnlando oni portis flamantan torĉon el Grekujo en la Olimpian urbon Helsinki.

Ankaŭ al nia kongreso venis multaj centoj da brulantaj torĉoj en koroj, kaj centoj da steloj simboligantaj la esperon.

Li finis, insiste admonante la esperantistaron daŭrigi la grandiozan laboron por efektivigi nian belan ideon: tiun ideon kiu estas esprimebla en la jenaj malmultaj vortoj: unu mondo, unu homaro, unu komuna lingvo. — Forta aplaŭdo sekvis.

Post la instiga kaj verva parolado eksonis refoje la himno de la esperantista popolo. Ĝiaj sentokaptaj tonoj ĉirkaŭŝvebis en la granda ejo tuŝante ĉies korojn. Per tio finiĝis la solena inaŭguro, kiu daŭris du horojn.

La inaŭguro de la 22a kongreso de blindaj esperantistoj

okazis dimanĉon posttagmeze. La prezidanto, instruisto Halvdan K a r t e r u d, prezidis la kunvenon. La honora prezidanto de la kongreso, inĝeniero O. Brodmann S l e t t e r ø d, faris tre sukcesan malferman paroladon. Sekvis salutaj paroladoj el Danlando, Anglujo, Finnlando, Francujo, Jugoslavujo, Nederlando, Svedujo kaj Svislando.

La prezidanto de Norvega Blindulasocio, s-ro B j a r n e N ö k l e b y, kore salutis en la nomo de Norges Blindeforbund, s-ro Oskari L e t h i v a a r a parolis en la nomo de la skandinavia kunlaborkomitato. V. S e t ä l ä, kiu gvidis kursojn por blinduloj en Finnlando de post 1912, deziris prosperon kaj sukceson al la blinduloj.

S-ro Harald T h i l a n d e r, Svedujo, kaj W. P. M e r r i c k, Anglujo, estis elektataj honoraj membroj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

La kunveno decidis sendi salut-telegramon al la norvega reĝo kiu festas sian 80an naskiĝdatan revenon samtage.

120 personoj el 14 landoj ĉeestis en la kunveno.

Estrarkunveno de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

La estrarkunveno okazis dimanĉon posttagmeze sub prezido de f-ino Violet N i x o n. Si raportis pri laboroj faritaj dum la jaro, kaj precipe oni diskutis kiel sukcesi pri starigo de gazeto por ILEI. Oni

„La rigardejo de la reĝo", ne malproksime de Oslo. Panoramo super la regiono Ringerike. En la fono maldekstre la montaro Nore.

decidis komisii al Jeanne Dedieu esplori ĉu ILEI povos disponi 1—2 paĝojn en la organo de la francaj Esperanto-instruistoj. F-ino Nixon estis reelektita prezidantino kaj f-ino Dedieu vicprezidantino. Sekretario kaj kasisto Einar Dahl.

La inaŭguro de Internacia Somera Universitato

okazis en la universitata aŭlo dimanĉon vespere. La rektoro de ISU., prof. d-ro Olav Reiersøl, malfermis la V-an laborperiodon per alparolo mallonga. Li akcentis la gravecon de komuna lingvo kiel Esperanto por ĝenerala universitata uzo kiel oni iam uzis la latinan lingvon. Li diris ke la celo de ISU. estas internacia universitato, kaj deklaris la V-an laborperiodon malfermita. La instigo al la esperantistoj veni precize al la prelegoj de la ISU. estis vere necesa, ĉar el la ekstera antaŭ ĉambro venis bruo de atendantaj malfruintoj.

Unua ĝenerala kunveno

La prezidanto de UEA, s-ro Ernfrid Malmgren, prezidis la kunvenon. Post bonvenigaj vortoj al la proksimume 500 ĉeestantoj, li legis diversajn salutleterojn kaj telegramojn, inter alie de M. Herriot, prezidanto de la franca ĉambro de deputitoj kaj urbestro de Lyon, de la ministro pri eksteraj rilatoj de Urugvajo, de la urbestroj en Vieno kaj Wörgl. Salutis ankaŭ la konataj esperantistoj: Nylén, Bastien, Carreira kaj Kempeneers, kiuj ne povas partopreni la kongreson. La ĝenerala kunveno ĝoje akceptis salutojn de esperantistoj en Polujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Oni decidis sendi saluttelegramojn al la vicprezidanto de UEA, s-ro Kempeneers, al s-ro Hans Jakob kaj al tri honoraj prezidantoj de UEA, s-ro Bastien, Kursteiner kaj Privat.

Salutis la ĝeneralan kunvenon s-rino Isbrucker nome de la Internacia Esperanto-Instituto, d-ro Hugo Sirk nome de la Altlernejo en Vieno.

Antaŭ ol doni la parolon al la sekciaj gvidantoj, la prezidanto direktis la dankon al ili pro la granda laboro, kiu kaŝas sin malantaŭ la koncizaj raportoj.

S-ro A. C. Oliver raportis pri financoj kaj administrado. Li povis preskaŭ certe promesi, ke ne estos malgajno en ĉi tiu jaro dank' al la altigo de la kotizo. Li opinias ke nur 5 % de la membroj eksiĝis pro la altigo. Aplaŭde la ĉeestantoj akceptis la sciigon, ke la novembra numero de la revuo „Esperanto" estos 48paĝa. S-ro Oliver instigis al ĉiuj varbi novajn individuajn membrojn por UEA.

S-ro Kennedy raportis pri la fakaj asocioj de UEA. Li ricevis raportojn de ĉiuj 12 sekcioj krom unu. La 1-a, asocio poŝtmarkkolektantoj (IAPK), havas propran revuon kaj 200 membrojn en 18 landoj. La 2-a, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), aranĝas ĉiujare kongreson kaj eldonas la organon „Espero Katolika". La 3-a, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), havas 7 landajn asociojn kaj okazigas konferencojn de instruistoj en kelkaj landoj. La 4-a, Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj (ILEPTT), kongresis en Lindau (Germanujo). Partoprenis proks. 500 esperantistoj el 11 landoj. La 5-a, Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), raportis pri 327 anoj en 12 landoj. La 6-a, Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), havis konferencojn. La 7-a, Kvakera Esperantista Societo (KES), havas 1300 membrojn. La 8-a, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA), raportas, ke la ĵurnalisto Adamson pasintjare vizitis Jugoslavujon kaj faris valorajn kontaktojn por la 38a UK tie. La 9-a, Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), havas 200 membrojn en 12 landoj. La asocio ĉiujare aranĝas konferencon. La 10-a, Tutmonda Junular-Organizo (TJO), havas 750 membrojn en 30 landoj. Ĝi kongresis pasintjare en Haarlem, ĉi-jare tuj post la UK en Ry, Danlando. La 12-a, Universala Ligo (UL), havas 7771 membrojn, 37 landajn reprezentantojn kaj 1346 aktivajn membrojn.

La rilatoj inter UEA kaj SAT

Ĉar prof. Lapenna ne alvenis ĝustatempe por raporti, s-ro Malmgren deklaris la vorton libera, kaj pluraj kaptis la okazon demandi pri diversaj aferoj La unua demando estis pri la kunlaboro inter UEA kaj SAT. S-ro Malmgren menciis ekzemple la sendadon de la malferma letero al J. V. Stalin. Al la demando pri ebleco de kunfandiĝo de UEA kaj SAT, s-ro Malmgren respondis ke tio estas malfacila afero. Li menciis ke en kelkaj landoj troviĝas pluraj esperantistaj organizoj. Ni estu feliĉaj ke ekzistas nur du internaciaj organizoj.

Al la demando, ĉu ne estas eble aranĝi la kongresojn de UEA kaj SAT en la sama urbo aŭ lando, s-ro Malmgren respondis ke laŭ lia persona opinio tro granda nombro da kongresanoj malebligas intimajn kontaktojn, oni malaperas en la aro. Li ankaŭ opinias ke ekzemple 5000 kongresanoj ne imponas la mondon. S-ro Vasiljev (de KELI) petis la vorton kaj forte esprimis ke li ne samopinias kun la prezidanto. Ni devas montri ke ni povas kunlabori kaj vivi sub la sama tegmento. S-ro Malmgren opiniis ke s-ro Vasiljev miskomprenis lin. Mi ĉiam laboris por kunagado inter UEA kaj SAT. S-ino Isbrucker diris ke estas plena ebleco por SAT ekzisti en UEA sub la fakaj sekcioj.

Salutoj

S-ro C. Støp-Bowitz salutis de ISAE kaj diris ke ĝi havas bonajn kontaktojn kun UNESKO.

S-ro A. A. Ager salutis de la Kooperativa Societo en Londono, la plej granda en la mondo, kaj diris ke multaj kooperativaj esperantistoj faras bonan laboron por Esperanto. Okaze de la Festivalo de Granda Britujo, oni presis grandan afiŝon Esperantan. La esperantistoj petu tiun afiŝon.

S-ro C. Støp-Bowitz informis pri la balo, kiu estos oficiala akcepto de la esperantistoj flanke de la Urbestraro, kaj ke estos regalo. Kvankam la Urba Domo estas la plej granda ejo en la urbo, ĝi estas tamen iom malgranda por ni.

Daŭrigo de la raportado

Prof. Lapenna, kiu unue petis pardonon pro la malfruiĝo, ĉar li ne sciis ke li devas raporti, raportas pri Centro de Esploroj kaj Dokumentado. Li menciis interalie ke CED regule dissendas dokumentojn en tri lingvoj al pli ol 100 institucioj. Estas la espero ke tiuj dokumentoj povu aperi en ankoraŭ kelkaj lingvoj. Novaĵoj estas regule sendataj al la landaj gazetaraj servoj. D-ro Lapenna emfazis la nivelo-altiĝon de niaj kongresoj. Kiel ekzemplon de la intereso pri la artaj konkursoj li menciis ke la nombro de partoprenintoj ĉiam kreskis. La celo de nia Somera Universitato estas unumonata kunestado en iu universitata urbo. La prelegoj en la Somera Universitato eble estos presataj. Prof. Lapenna havis plurajn konferencojn kun la reprezentantoj de UNESKO.

S-ro Isbrucker salutas de la Akademio de Esperanto kaj diras ke oni decidis oficialigi la sufikson end, sed en amuza maniero daŭrigas ke eble oni devas revoki tiun decidon ĉar ĝi ne estas tute laŭleĝe farita.

S-ro Petit raportas pri la kvara sekcio: Esperanto en la Internacia Trafiko kaj Komerco. Li akcentis la propagandan efikon de la aŭtobusaj vojaĝoj de esperantistoj kaj de la internaciaj restadoj esperantistaj. S-ro Petit atentigas pri la dulingvismo kiu nun ŝajne ekfloras. Temas pri la enkonduko de la angla kaj franca lingvoj. Ni devas kontraŭbatali la dulingvismon ĉar ĝi povos fariĝi grava bato kontraŭ Esperanto.

S-ino Isbrucker opinias ke ni ne bezonas timi la dulingvismon kiu cetere estas malnova afero sub nova nomo.

S-ro Szilagyi petas la kongreson estonte atenti pri la esperantistaj infanoj, ke ili povos kunveni. Li zorgos pri la ĉi-jara renkontiĝo.

S-ro Malmgren petas la esperantistojn pritrakti eventualajn proponojn en siaj lokaj grupoj antaŭ ol prezenti ilin en la kongresoj. Grave estas ke oni ankaŭ kun eventuala propono indiku kiel oni ekonomie solvu la aferon. La prezidanto finas la unuan ĝeneralan kunvenon.

(EP en la Septembra numero daŭrigos la detalan raporton pri la 37a UK.)

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netaŭgulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Dekdua daŭrigo)

Mi rapide turniĝas kaj ekvidas tri junulojn en longaj, bluaj manteloj, el kiuj la unu ludas hobojon, la alia la klarneton kaj la tria, kiu sur la kapo havis malnovan tripintan ĉapelon, blovis la kornon. Tiuj subite akompanis min, tiel ke la tuta arbaro resonis. Mi nehezitante eltiras mian violonon kaj tuj vigle ludas kaj kantas kun ili.

Tiam ili rigardis seniluziigite unu la alian, poste la kornisto la unua lasis malŝveli siajn plenblovitajn vangojn kaj la kornon forprenis de la buŝo, ĝis kiam fine ĉiuj silentiĝis kaj rigardis min. Mi ĉesis mirigite kaj ankaŭ rigardis ilin.

„Ni opiniis", fine diris la kornisto, „ĉar la sinjoro havas tian longan frakon, la sinjoro estas vojaĝanta anglo, kiu piedirante admiras ĉi tie la belan naturon. De li ni volis gajni vojaĝmonon. Sed ŝajnas al mi, ke la sinjoro estas ankaŭ muzikanto."

„Por diri la veron: kasisto", mi respondis, „venanta rekte el Roma; sed ĉar dum nemallonga tempo mi nenion enkasigis, mi vivis dumvoje per mia violono."

„Tio ne donas multan profiton en la nuna tempo!" diris la kornisto, kiu dume estis reirinta al la arbaro kaj per sia tripinta ĉapelo vivigis malgrandan fajron, kiun tie ili estis ekbruligintaj. „Kompare la blovantaj instrumentoj estas iom pli enspezigaj", li daŭrigis. „Kiam iaj gesinjoroj tagmanĝas tute trankvile, kaj ni eniras neatendite en la volbitan vestiblon kaj triope komencas blovi per tutaj fortoj — tuj servisto kurante elvenas kun mono aŭ manĝaĵo, nur por ke oni estu liberigita de la bruado. Sed ĉu la sinjoro ne volas preni manĝeton kun ni?"

La fajro nun tre gaje flagregis en la arbaro; la mateno estis malvarmeta; ni ĉiuj ĉirkaŭsidiĝis sur la herbo, kaj du el la muzikistoj prenis de sur la fajro poteton, en kiu estis kafo kaj ankaŭ jam lakto, elprenis panon el siaj mantelpoŝoj kaj trempis kaj trinkis alterne el la poto, kaj ili tion trovis tiom bongusta, ke estis vera plezuro rigardi.

Sed la kornisto diris: „Mi neniel povas ŝati la nigran fitrinkaĵon", kaj ĉi-kune prezentis al mi la unu duonon de granda, duobla buterpantranĉaĵo; poste li aperigis botelon da vino. „Ĉu la sinjoro ankaŭ deziras plenbuŝon?"

Mi faris fortan trinkon, sed rapide devis ĉesi kaj kuntiri la tutan vizaĝon; ĉar ĝi havis la guston de „tri-viroj-vino".

„Ĉi tie kreskinta", diris la kornisto, „sed la sinjoro ruinigis en Italujo sian germanan guston."

Poste li fervore serĉadis en sia vojaĝsako kaj fine tiris el inter ĉiaj aĉaĵoj malnovan ĉifonitan landkarton, sur kiu ankoraŭ la imperiestro en kompleta ornato estis videbla, kun la sceptro en la dekstra mano kaj la imperia pomo en la maldekstra. Delikate li malfaldis ĝin sur la tero, la aliaj alŝoviĝis pli proksimen, kaj nun ili kune interkonsilis, kiun marŝvojon ili estu prenontaj.

„La libertempo baldaŭ finiĝos", diris unu; „tuj post Linz ni devos turni nin maldekstren; tiamaniere ni venos ankoraŭ ĝustatempe al Praha."

„Ej vere!" kriis la kornisto, „por kiu vi volas tie fajfi ion? Nenio escepte de arbaroj kaj brasikokulturistoj, neniu rafinita artgusto, nek akzeptindaj senkostaj nutrado kaj loĝejo!"

„Ho sensencaĵoj!" respondis la alia. „Guste la vilaĝanojn mi ŝatas plej multe. Tiuj scias plej bone, kie onin premas la ŝuo, kaj ne estas rigoraj, se kelkiam oni fajfas malĝustan noton."

„Jen vidu, vi ne havas point d'honneur!" kontraŭdiris la kornisto, „odi profanum vulgus et arceo! diras la latinlingvulo."

„Nu, almenaŭ preĝejoj nepre estos ĉe nia vojo", opiniis la tria; „tiam ni gastiĝos ĉe sinjoroj la pastroj."

„Via plej obeema servisto!" diris la kornisto. „Tiuj donas malgrandan monon kaj grandajn paroladojn, ke ni ne vagadu tiel senutile en la mondo, sed pli bone fordonu nin al la sciencoj, precipe ĉar la latina lingvo fluis el iliaj buŝoj. Ne ne, clericus clericum non decimat. Sed kial plendi pro tio? Ankaŭ sinjoroj la profesoroj sidas ankoraŭ en Karlsbad, kaj ili mem ne tro diligente eluzas la tagojn."

„Jes, distinguendum est inter kaj inter", respondis la alia, „quod licet Jovi, non licet bovi!"

Mi nun rimarkis, ke ili estas studentoj el Praha, kaj mi eksentis veran respekton al ili, precipe ĉar la latina lingvo fluis el iliaj buŝoj.

„Ĉu via sinjora moŝto ankaŭ estas studinto?" poste demandis min la kornisto.

Mi respondis modeste, ke por la studado mi havis ĉiam grandan emon, sed neniam monon.

„Tio neniel malhelpas", kriis la kornisto, „ankaŭ ni havas nek monon, nek riĉan amikaron. Sed saĝa kapo devas scii helpon. Aurora musis amica, t. e.: ne perdu vian tempon per multa matenmanĝado. Sed kiam la tagmezaj sonoriloj poste sonoras de turo al turo kaj de monto al monto supèr la urbon, kaj la lernantoj subite kun granda kriado elkuregas el la malnova senluma kolegio kaj svarmas en la suna helo tra la stratetoj — tiam ni iras al la patro kuirejestro ĉe la kapucenoj kaj trovas por ni pretigitan tablon; kaj se ĝi ne surhavas kovrilon, tamen plena poto surstaras por ĉiu. Tiam ni ne longe demandas plu kaj manĝas kaj samtempe pliperfektiĝas ankoraŭ en la latina lingvo. Vidu, sinjora moŝto, tiamaniere ni studas de unu tago al la alia. Kaj se poste venas fine la libertempo kaj la aliaj forveturas aŭ -rajdas al siaj gepatroj, tiam ni kun la instrumentoj sub la manteloj elmigras tra la stratetoj kaj el la pordego, kaj la tuta mondo estas malfermita por ni!"

(Daŭrigota)

Sunaj horoj

DE R. MUÑOZ SECA

Ebenaĵo vastega, senarba, dezerta. Aŭgusta suno, bruliga, fritvarmega. Ŝoseo mallarĝa, polvoplena, kiu perdiĝas malproksimen...

Sur la intense blua ĉielo eĉ ne unu nubeto bonfaranta. Sur la preskaŭ fumanta tero nek rivereto nek fonto nek eĉ tufo da herbaĵo.

Tremadas la aero vibrigata de la suna fajro. Cirpadas cikado siajn unutonajn akrajn sonojn. Zumas muŝego zigzage fluganta, kvazaŭ ebria pro la lumo...

Tre malrapide antaŭen ŝoviĝas sur la ŝoseo maldelikata ĉaro, tirata, inter la timonoj, de mulino malbone nutrita, kaj antaŭ ŝi de azenino malgranda kun ostelstara lumbo kaj larmaj okuloj.

Alligita per mallonga ŝnuro al la postaĵo de la ĉaro, hundino dubegriza, malgrasa, malforta, vojiras afliktite kun la kapo tere.

Interne en la ĉaro dormas la ĉaristo. Ĉe la ĉaristo, sterniĝinta sur malplenaj sakoj, hundideto, tre malmultajn tagojn aĝa, montras sian dikan kapeton senespriman kaj rigardas per okuloj malvigletaj jen al la malproksima horizonto, jen al la grizaĉa hundino, sia patrino.

La mulino (levante la kapon, duonmalfermante la okulojn kaj spirante malforte): Kia posttagmezo, Lucera!

La azenino (forskuante la muŝojn): Ne parolu al mi! Kaj danke, ke ni iras almenaŭ senŝarĝe.

La mulino (montre al la ĉaristo): Ĉu dormas ankoraŭ la tirano?

La azenino: Certe! Kiel, alie, ni irus tiel malrapide? Bona li estas! Eĉ vidante nin morti, li devigus nin plirapidi. Despoto li estas!

La mulino: Kiel ĉiuj homoj.

La azenino: Kiel ĉiuj, ne! Mian patron, kiu loĝis en grandaj urboj, mi aŭdis diri, ke ekzistas homoj bonaj al ni. Cent fojojn li ripetis al mi: „Filino mia, kiam vi vidos homojn, kiuj kondukas veturilojn kaj ĉarojn, de neniu besto triratajn, humiliĝu kaj respektu ilin; ili estas niaj savantoj. Tiom ili amas nin, ke por nin imiti ili kovras siajn kapojn per oreloj kiel la niaj; ili imitas la simion somere kaj vintre ili sin vestas per ursaj peltoj, kaj opinias sia fiero similiĝi al la respektiva besto."

La mulino (nekredema, kiel multaj aliaj mulinoj): Estas strange!... Neniam mi vidis tiajn homojn. Ĉu ne trompis vin eble via patro?

La azenino (grave): Ne. Mia patro ĉiam diris la veron; pro tio li estis granda azeno.

La hundido (streĉante siajn membrojn, oscedante kaj antaŭen metante la kapon ĝis super la ĉara rando): Panjo!...

La hundino (ame ĝin rigardante): Kio?

La hundido: Venu, ĉi-supreniru! Mi malsatas.

La hundino (malĝoje): Mi ne povas, filo mia; mi estas alligita. Kia bedaŭrego!

La hundido (stariginte sin, post granda peno, kaj ŝanceliĝante): Do, mi iros al vi...

La hundino (timegante): Ne, ne!

La hundido (naive): Mi povas tre bone.

La hundino: Ne, ne moviĝu, pro Dio!

La hundido (rigardante al ŝi per avidaj okuloj): Sed mi malsatas, panjo mia! Kial vi ne volas, ke mi malsupreniru?

La hundino (korpremegite): Tial ke vi farus al vi vundeton falante, ĉar ankoraŭ vi ne scipovas iri kaj ne povus nin sekvi; ĉar vi restus survoje; forlasita kaj sola, dum la ĉaro, pli forta ol mi, min fortrenus malproksimen de vi... Silentu! sternu vin; dormu, filo mia, dormu!

La hundido (ankoraŭ pli elmetante la korpon): Mi malsatas!

La hundino (terurite): For!... Foriĝu internen! (Profunda radkavo ekŝancelas la ĉaron; la hundido perdas sian mallertan ekvilibron kaj falas ŝoseen.)

La hundido (tre kontente): Ĉu vi vidas? Mi ne vundiĝis.

La hundino (fosante siajn piedojn en la teron, kvazaŭ ŝi volus per tiom malgranda forto haltigi la iron de la veturilo): Venu! Proksimiĝu al mi! Tuj! Ke mi povu vin ekpreni per miaj dentoj!

La hundido (luktante por sin levi): Jes, atendu!

La hundino (kiel antaŭe gigante streĉante siajn fortojn; sentante ke la ŝnuro ŝin tenanta vundas, sufokas ŝin): Venu!

La hundido (singulte plorante): Mi ne povas. (Vidante ke la ĉaro malproksimiĝas kaj kunfortrenas la korpon preskaŭ senvivan de ĝia patrino): Panjo! Panjo mia, ne lasu min ĉi tie!

La hundino (kriante en plej alta angoro): Lucera, pro viaj filoj, ekhaltu!

La azenino: He? Kio okazas?

La hundino: Mia ideto! Ĝi falis! Ĝi ne povas iri!...

La azenino (al la mulino): Atendu vi, he!

La mulino: Jes! Por ke la tirano vekiĝu kaj tanu nian haŭton per batoj: vi estas aroga!

La hundino: Bonvolu!

La azenino (al la mulino): Haltu, diras mi!

La mulino (obstinege): Ne!

La azenino: Estas ŝia filo!

La mulino: Kaj al mi, kiom koncernas tio? Kial ŝi havas lin?

La azenino (kun indigno): Kion scias vi pri filoj kaj amoj, raso senfrukta, malbenita! Haltu, aŭ mi frakasos piedbate vian bruston!

La mulino (haltante pro la minaco): Estu! Vi superas min nunmomente je forto kaj devigas min fari vian volon; sed ve al vi, se la tirano min batos! Tiam estos mi, kiu rompos vian bruston je pecoj.

La hundino (al la hundideto, malrapide-malrapide alproksimiĝanta): Venu, filo mia, venu, ne ripozu! Ĉi tie ĉe mia flanko vi ripozos.

La hundido (denove tre kontente): Jes, panjo; rigardu, kiel bone mi marŝas.

La mulino (inter la dentoj murmurante): Ni vidos, kiom kostos al ni ĉi tiu ŝerceto.

La azenino: Ne timu! La viro, vidonte la hundidon surtere, komprenos la motivon de nia halto.

La mulino: Kion li povos kompreni estante homo?

La azenino: Do, mi oblikvumos kiom mi povos kaj starigos min horizontale sur la vojo, por vidigi al li, ke mi estas la sole kulpa.

La mulino (pli konforme): Tio ja estas alia afero. (La azenino oblikvumas, horizontale starigas sin kaj vidas, kiel la hundideto, fine!, venas al la flanko de sia patrino, kaj vidas, kiel tiu sin ĵetas teren kaj altiras ĝin al si kaj alproksimigas al ĝi siajn plenajn mamojn.)

La azenino (kortuŝite, memorante pri doloroj kaj ĝojoj pasintaj): La infanoj! (El ŝiaj malbrilaj okuloj elfluas larmoj. Malica muŝo eksidas en ili. — Paŭzo.)

La mulino (kapskuante kaj tintigante brue la sonoriletojn de sia ĉirkaŭkolaĵo): Sed ĉu ni volas pasigi ĉi tie nian vivon?

La homo (vekiĝante kaj rektigante sin, mirigite): Kio estas tio? (Pugne ekprenante la vipobastonon): Lucera!

La mulino (por si mem): Nun ni vidos!

La azenino (ne movante sin): Okazu, kion Dio volas!

Fähigkeit ruhiger Erwägung:
Anfang aller Weisheit,
Quell aller Güte!

Kapableco de trankvila pripensado:
Komenco de ĉia saĝeco,
Fonto de ĉia boneco!

M. Ebner-Eschenbach

STATISTIKEN

Es gibt darüber einen sehr geistreichen, aber durchaus nicht sehr wohlwollenden Ausspruch: er lautet: „Was sie enthüllen, ist verführerisch, aber entscheidend ist das, was sie verbergen." Wir wollen nicht annehmen, daß er auf die folgenden Ausführungen zutrifft. Wenn man jedoch durchaus will — nun ja; aber man wird trotzdem immer noch interessante Feststellungen treffen können.

Eine Umfrage - recht lehrreich

Ergebnisse einer Umfrage unter den Teilnehmern am internationalen Zeltlager der Esperanto-Jugend in Garmisch-Partenkirchen, Pfingsten 1948. (Die Umfrage geschah durch die Jugendsektion der Esperantogruppe Stuttgart).

Es wurden befragt: 200 Jugendliche, darunter 24 nicht-deutsche. Das Durchschnittsalter betrug 20 Jahre.

Berufliche Zusammensetzung:
Schüler und Studenten 71 = 35,5%
Kaufmännische Berufe: 36 = 18,0%
Handwerkliche Berufe: 44 = 22,0%
Sonstige Berufe: 49 = 24,5%

Auslandskorrespondenz in Esperanto hatten 135 Jugendliche = 67,5%.

Die durchschnittliche Lernzeit bis zum Beginn der Esperanto-Korrespondenz betrug 3,6 Monate. Durchschnittlich wurde jeweils mit 4,7 Ländern korrespondiert.

Eine oder mehrere Fremdsprachen hatten gelernt:
139 = 69,5% aller Jugendlichen
94 = 69,6% der korrespondierenden Jugendlichen
45 = 69,2% der nicht korrespondierenden Jugendlichen

Die durchschnittliche Lernzeit bis zum Beginn der Korrespondenz betrug bei den Jugendlichen, die eine oder mehrere Fremdsprachen gelernt hatten, 3,2 Monate; bei denen, die keine Fremdsprache gelernt hatten, 4,0 Monate. Nur germanische Sprachen hatten gelernt: 28 der korrespondierenden Jugendlichen; nur romanische oder germanische und romanische: 66. Die durchschnittliche Lernzeit bis zum Beginn der Korrespondenz betrug in beiden Fällen 3,2 Monate.

Eine Fremdsprache hatten gelernt:
37 = 17,5% aller Jugendlichen.
23 = 17,0% der korrespondierenden Jugendlichen
14 = 21,5% der nicht korrespondierenden Jugendlichen

Die durchschnittliche Lernzeit bis zum Beginn der Korrespondenz betrug in diesem Falle 3,0 Monate.

Zwei Fremdsprachen hatten gelernt:
50 = 25,0% aller Jugendlichen
32 = 23,6% der korrespondierenden Jugendlichen
18 = 27,7% der nicht korrespondierenden Jugendlichen

Die durchschnittliche Lernzeit betrug 3,5 Monate.

Drei und mehr Fremdsprachen hatten gelernt:
52 = 26,0% aller Jugendlichen
39 = 29,0% der korrespondierenden Jugendlichen
13 = 15,4% der nicht korrespondierenden Jugendlichen

Die durchschnittliche Lernzeit betrug 3,2 Monate.

Von 71 Schülern und Studenten korrespondierten 48 = 67,6% bei einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,4 Monaten.

Von 36 Angehörigen kaufmännischer Berufe korrespondierten 30 = 83,3 % bei einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,7 Monaten.

Von 44 Angehörigen handwerklicher Berufe korrespondierten 28 = 63,6% bei einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,7 Monaten.

Von 49 Angehörigen sonstiger Berufe korrespondierten 29 = 61,2% bei einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,5 Monaten.

Durch Kurse lernten 151 = 75,5% der Jugendlichen. Privat (aus Lehrbüchern, im Elternhaus, usw.) lernten 49 = 24,5% der Jugendlichen.

Von 151 Jugendlichen, welche in Kursen gelernt hatten, korrespondierten 98 = 64,9% nach einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,9 Monaten.

Von 49 Jugendlichen, welche privat gelernt hatten, korrespondierten 37 = 75,5% nach einer durchschnittlichen Lernzeit von 3,2 Monaten.

Mitglieder internationaler Jugendorganisationen waren 38 = 19,0% der Jugendlichen.

Die Durchschnittszahlen der ausländischen Jugendlichen weisen keine Abweichungen von denen der deutschen auf.

Dieter Schwarzkopf, Stuttgart

Wer liest fremd?

Wie „Die Welt" in ihrer Nummer vom 8. 7. 1952 vom „Institut für Demoskopie" in Allensbach (Bodensee) berichtet, wurde vor kurzem von diesem zum ersten Male eine Befragung von 2000 Personen durchgeführt, wie viele Menschen im Bundesgebiet und in West-Berlin in der Lage sind, fremdsprachliche Texte zu lesen. Darnach erklärte jeder zweite Erwachsene in Hamburg und Bremen, mindestens eine fremde Sprache lesen zu können (48 %); im Bundesdurchschnitt konnte nur jeder dritte (31 %) diese Frage mit Ja beantworten.

Englisch (21 %) wurde am häufigsten genannt. An zweiter Stelle steht Französisch mit 15 %, dann kommen Italienisch, Spanisch und Russisch in großem Abstand. Sie werden lediglich von je 1 % der Erwachsenen genannt.

So weit „Die Welt". Es ist schade, daß bei dieser „Volksbefragung" nicht auch nach der Kenntnis des Esperanto gefragt wurde. Man wird wohl ohne weiteres behaupten dürfen, daß seine Kenntnis durchschnittlich nicht hinter der von Italienisch usw. zurückbleiben würde. Ohne Zweifel darf wohl auch angenommen werden, daß derjenige, der Esperanto „liest", dies bestimmt mit derselben, wenn nicht mit größerer Fertigkeit tut, als das eine Prozent, das angibt, die genannten Sprachen zu „lesen". Meist ist es ja so, daß die Esperanto-„Leser" auch Esperanto-„Schreiber" und -„Sprecher" sind.

Seit der Veröffentlichung unserer Sprache sind Jahrzehnte vergangen. Zwei Generationen von Esperantisten leben bereits nicht mehr. Aber es gibt doch noch eine unserer Ansicht nach bedeutende Anzahl von Esperanto-Kennern und -Könnern, die einfach unbekannt sind. Sie wieder zu lebendiger Tätigkeit heranzuziehen, dürfte eine bestimmt nicht leichte, aber lohnende Aufgabe unserer Einzel-Esperantisten wie auch Gruppen und Verbände sein. Jfb.

Simpla poemeto

Ĉarma, kara amatino,
vi, al kiu mi sopiras,
vi, plej dolĉa belulino,
forto kiu ĉiam tiras
min de malgaieco for:
el la kor'
mi per tiu poemeto,
kiu ne vin mem atingos,
diru nur, ke — ĉu sekreto? —
amon oni ne estingos.

Adolf Burkhardt
(sendis Rudolf Bögel, Urach)

La homo: Azenino! (Desaltas de la ĉaro; saltante li ekvidas la hundideton kiu, jam sata, ludpetolas kun sia patrino): Tiu besteto!... Preskaŭ esti mortigita! (Ekprenas la hundidon kaj ĵetas ĝin ĉarinternen. La hundino, dankema, provas alsalti kaj karesi lin; la azenino, kontentigita, reiras obeeme en la tirvicon. La ĉaro denove ekruliĝas.)

La azenino (al la mulino): Li vidis la hundideton tere; li devas esti nin kompreninta.

La homo (elmezurante sur la ostan lumbon de Lucera du terurajn bastonbatojn): Azenino!! Vi haltas meze survoje ĉe tia suno? (La azenino kurbiĝas kaj blovspiregas pro doloro. La mulino kaŝe ridetaĉas. La hundino klinas la kapon teren, afliktite.) — Ŝi ja ne estos mallaborema?! Finfine, azenino!

La azenino (sentante, pli ol la doloron, la maljustecon de la puno): Finfine, homo!

Antaŭenŝoviĝas la ĉaro, ŝanceliĝante, krakadante. La ĉaristo, sidante sur unu el la timonoj, fumas kaj murmurkantetas; la mulino pensas pri la dezirata manĝujo; la bona azenino rememoras malĝoje pri la karesoj de azenideto kun fruntstelo (hisp. „lucero"), kiun homoj senkoraj forŝiris de ŝi por ĉiam. Kaj muŝego zumas, flugas zigzage, kvazaŭ ebria pro lumo.

El la Hispana: José Fernando Berenguer

Auf „Gestikulationisch"

„»Buenos dias, gracias, buenas noches« und »adiós«. Vier Worte Spanisch. Eine temperamentvolle Señorita spricht ein paar hundert in der Minute (wenigstens klingt es so). Es waren 20 Señoritas, alle temperamentvoll. Sie blieben zwei Tage. Und wir konnten nicht Spanisch. Es war trotzdem schön. Man half sich auf Französisch, Englisch und »Gestikulationisch«. Aber solch eine Völkerverständigung ist anstrengend."

Ja, das kann man wohl verstehen, eine solche Völkerverständigung kann ja gar nicht anders sein. Wenn man dabei noch berücksichtigt, daß Spanier und Spanierinnen im allgemeinen nicht sehr viel Talent für Fremdsprachen haben, so wird ohne weiteres klar, daß das internationale „Gestikulationisch" eine zwar sehr anstrengende, aber im selben Maßstabe sehr unzulängliche Sache war. Müssen derartig unbefriedigende Besuche von Ausländern nicht zwangsläufig nach Abstellung des Übels durch den allgemeinen Gebrauch einer leichten, wohlklingenden und zwanglos zu handhabenden „Brudersprache" schreien? Wie lange wollen sich die Menschen noch selbst jeder einfachen Verständigung berauben? Aber es scheint, daß gerade in dieser Beziehung es wie ein Fluch auf ihnen lastet. Für alles haben sie Zeit und Geld, manchmal für geradezu unvorstellbare Tor- und Tollheiten: für die Einführung eines so hohen Kulturguts wie die Einführung einer Welthilfssprache sind sie anscheinend nicht zu gewinnen.

Im übrigen: die 20 Señoritas waren in Köln, und der Bericht stammt aus der „Kölnischen Rundschau" vom 16. Juli 1952. Die anschließende Glosse natürlich nicht. Jfb.

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

Slango kaj duonslango

etwas ad acta legen formeti ion en la keston de forgeso (Z), rigardi ion finita, ne plu okupi sin pri ...
auf Anhieb je la unua provo
anlernen ekinstrui pri, enkonduki en. **~ling** novlernanto
anstehen, Schlange stehen atende viciĝi, vice atendi
s. anstellen alvicigi sin
ausgefallen (z. B. Wunsch) nekutima, eksterordinara
bis dato ĝis nun
engstirnig malvasthorizonta
fachsimpeln fakbabiladi
fadenscheinig 1) fadenmontra; 2) nekonvinka
von Fall zu Fall pokaze, laŭokaze
Feuer und Flamme sein esti en arda entuziasmo por ...
gut in Form sein esti en bona stato (korpa, spirita)
„ein Gedicht" rave
Gefühlsduselei malklareco de sentoj, malklara sentado
ich bin wie gerädert mi estas kvazaŭ radumita; ĉiuj miaj ostoj doloras
die Apparatur hierzu **läßt sich einfach halten** povas esti simpla
Hand anlegen kunhelpi, -labori; **letzte ~ ~** finpretigi
haushoch (bildl.) superege, kun granda -eco (antaŭeco)
in hellen Haufen, Scharen en grandaj aroj, aregope
Landratte (firm) terulo
das Letzte herausholen eltiri la lastajn fortojn, ĉion eblan
jm. links liegenlassen, schneiden montri al iu malŝaton, ignori iun
aus der Luft gegriffen senbaza, fikcia
Mädchen für alles ĉiofarantino, servistino por ĉia laboro (bildl. ggf. auch ohne -in-)
Mauerblümchen neglektatino, neatent-
meine Wenigkeit scherzhaft: mia malmoŝto
Milchmädchenrechnung ... konstrui kastelojn en la aero (Z), utopiaj spekulacioj
mit an erster Stelle: inter la unuaj, unu el la unuaj
etwas nahelegen sugesti ion
ein Pappenstiel bagatelo
er hat einen Pick auf mich, hat mich gefressen li havas (teruran) antipation kontraŭ mi
sich produzieren montri, prezenti siajn kapablojn
aus dem Rahmen fallen 1) ne harmonii kun la medio; 2) konduti sentakte
Schindluder treiben mit misuzi, fi-
Das ist doch ein starkes Stück! Bela impertinentaĵo!
viel Staub aufwirbeln kaŭzi multan bruon
stempeln gehen ricevi senlaborulan renton
Stielaugen machen envie gapi
die Jacke **hält warm** tenas varma

Korekto al 6/52: Ĉe „ŝtepo" mankas steleto; ĉe Marsejlo ĝi êstas superflua, ĉar la vorto jam troviĝas en la literaturo.

Hans Wingen

Dum - Ĝis

Das Bindewort „dum" (dum li laboras), nicht das Verhältniswort „dum" (dum la laboro), hat wie das deutsche „während" zwei Bedeutungen: 1. „zur Zeit als" (während) und 2. „im Gegensatz zu" (wohingegen). Zwei Beispiele Zamenhofs: zu 1.: Forĝu feron, dum ĝi estas varmega, und zu 2.: Volapük jam longe estas mortinta, dum Esperanto daŭre vivas. Zamenhof hat also im ersten Satz nicht „dum kiam" und im zweiten nicht „dum ke" gebraucht. Es genügt auch vollkommen, den Begriff des zeitlichen „dum" ohne ein zusätzliches „kiam" auszudrücken; zudem ist „dum kiam" eine Tautologie (Bezeichnung eines Begriffs durch zwei oder mehrere gleichbedeutende Ausdrücke).

Mit „dum" (ohne „ke") als Begriff des Gegensatzes ist es nicht so einfach, denn es gibt Fälle, wo Mißverständnisse durchaus möglich sind, wenn man nur „dum" anwendet. Ein Beispiel: Li violonas, dum ŝi harpas. Das kann heißen: 1. er spielt Geige, während sie Harfe spielt (beide spielen gleichzeitig; er begleitet die Harfenspielerin); 2. er spielt Geige, wohingegen sie Harfe spielt (er hat das Geigenspiel und sie das Harfenspiel erlernt; von einem gleichzeitigen Zusammenspiel ist hier nicht die Rede). In diesem Fall 2 ist es empfehlenswert, „dum ke" anzuwenden, um Klarheit in den Satz zu bringen.

Da man „dum ke" bei namhaften Esperanto-Schriftstellern antrifft, soll man gegebenenfalls nicht vor seiner Anwendung zurückschrecken oder sich einer gleichsinnigen Satzbildung bedienen, etwa: li violonas, ŝi male (oder kontraŭe) harpas. Ein „dum kiam" zum Ausdruck des Zeitbegriffs anzuwenden, scheint mir aber in keinem Falle notwendig. Da wollen wir uns an Zamenhof und seine Beispiele halten.

Bei „ĝis" verhält sich die Sache ähnlich. Es ist ebenfalls Verhältnis- und Bindewort, und beide lauten im Gebrauch gleich. Bei Zamenhof finden wir unter einer Überfülle

---

Leonardo da Vinci

Aldone al la artikolo pri la geniulo Leonardo da Vinĉi sur paĝo 68 de EP ŝajnas al mi grave konstati, ke Leonardo estis vegetarano. Lia samtempulo Andrea Corsali skribis el Hindujo pri li al Giuliano de' Medici (jaro 1515): „Same kiel nia Leonardo da Vinĉi, la loĝantoj de tiuj ĉi regionoj ne manĝas viandon kaj ne permesas, ke oni kaŭzu doloron al vivantaj kreitaĵoj".

Leonardo mem diris: „Jam de mia frua juneco mi rifuzadas la uzon de viando, kaj venos la tempo, kiam la homoj, same kiel mi, konsideros la mortigon al bestoj tiel, kiel ili nun konsideras la mortigon al homoj".

Al personoj, kiuj kontraŭargumentis, ke estas same kruele manĝi vegetaĵojn kiel manĝi bestan viandon, Leonardo respondis, ke kreskaĵoj ne sentas doloron; se ili sentus, ili estus ricevintaj la povon eskapi kiel birdoj kaj bestoj, kiuj tiel kapablas fugi de estaĵoj minacantaj ilin.

Kiam Leonardo pasis tra foiroj kaj vidis birdojn en kaĝoj, li aĉetis la birdojn, por liberigi ilin. Pasante ĉe buĉista vendejo, li diris: „Vere, la homo estas la reĝo de la bestoj, ĉar lia bruteco estas pli granda ol ilia". Por li, krueleco estis nepardonebla peko. Estas strange, ke la plej multaj aŭtoroj de artikoloj pri li ne mencias tiun tre gravan kaj karakterizan trajton. Tiutempe oni ne jam parolis pri vitamenoj, klorhidratoj kaj prisanaj pedantaĵoj, sed vivis vegetare pro abomeno kontraŭ kadavraĵoj kaj pro etiko, estetiko kaj humaneco.

Oscar Bünemann

Traduktasko n-ro 23

La nuna traduktasko ne sekvas la ekzemplojn de la ĝisnunaj, sed ĝi estas tute alispeca. Ne nur sian tradukpovon oni devas montri, farante ĝin, sed eĉ multe pli sian logikan penskapablon kaj sian lertecon, elpensi lingvajn formojn kaj esprimmanierojn, kiuj ne estas simple tradukeblaj.

En kio do konsistas la hodiaŭa tasko? Nu, vi legas ĉi-sekve aron da paradoksaj dirajoj Germanlingvaj. Vi provu nun „traduki" Esperanten. Kompreneble vi tuj vidos, ke tio en la plimulto de la prezentitaj frazoj estos fakte neebla. Tiam provu ilin transformi, redoni la ideon en pure Esperanta vesto, sed tamen laŭeble konservi la ideon. Ni prenu ekzemplon: Sub n-ro 5 vi legas: Paradox ist, wenn ein Duett eintönig klingt. Oni povus ĝin traduki per „paradokse estas, kiam dueto sonas unutone", sed tio ne kaptas la tutan signifon de paradokseco entenata en la Germana diro. Eble jam pli bona traduko estus: „paradokse estas, kiam dueto sonas monotone", sed tio jam preskaŭ necesigas la ekzaktan konon de la greka vorto „monos", kiu signifas proksimume: sola, unu. —

Kaj la gajnoŝancoj: Simpla, sed akceptebla traduko, kiu iel ankoraŭ sentigas paradoksecon, gajnigas unu poenton.

Perfekta traduko montranta trafan paradokson gajnigas du poentojn.

Nova paradoksaĵo Esperanta, ne entenata en la donitaj Germanaj ekzemploj, gajnigas tri poentojn.

Kiu havos la plej multajn poentojn, ricevos la unuan, la du sekvantaj la duan kaj trian premiojn.

Eble iu ne tute precize scias, kio estas „paradokso". Laŭ Plena Vortaro: Opinio kontraŭa al la komuna opinio kaj tial ŝajnanta ofte malsaĝa.

Kiel premioj estas fiksitaj:

1. **La Nekonatino**, Novelo de R. C. Muschler
2. **Niko kaj Nina**, Postkursa legolibreto originala
3. **Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco**, traktaĵo

Ni rezervas al ni plimultigi la premiojn ĉe ampleksa partopreno.

Eldonejo kaj Redakcio

Paradox ist

1. wenn man eine **Standuhr gehen** läßt;
2. wenn man im **fünften Stockwerk** ist und singt: Im **tiefen Keller** sitz' ich hier;
3. wenn ein **Lehrer** (lies: Leerer!) **voll** ist;
4. wenn ein **Jäger** die **Flinte** ins Korn wirft;
5. wenn ein **Duett eintönig** klingt;
6. wenn ein **Erdgeschoß**bewohner den **ersten Stock**schnupfen bekommt;
7. wenn ein **Glühlampenfabrikant** dauernd die **Fassung** verliert;
8. wenn jemand ein **eingefleischter Vegetarier** ist;
9. wenn ein Klavier**stimmer** nicht in **Stimmung** ist;
10. wenn ein **Ketten**raucher keine einzige **Kette** im Hause hat;
11. wenn ein **Hell**seher **schlecht** sehen kann;
12. wenn ein **Wirtschafts**minister nie in eine **Wirtschaft** geht;
13. wenn ein **Kapellmeister** einen **unharmonischen** Charakter hat,
14. wenn man einen **Ketten**hund an der **Leine** hält.

---

von Beispielen: Mi atendos, ĝis vi venos; ĝis la bela sonĝo de l' homaro . . . usw. Also nicht „ĝis kiam", das sich im Laufe der Jahre unliebsam breitgemacht hat, aber nach und nach verschwindet. Es hat sich als nutzloser Pleonasmus (Überfülle des Ausdrucks) erwiesen. Anders verhält es sich in dem Satz: Ĝis kiam vi restos en B.? Hier ist „ĝis" ein Verhältnis- und „kiam" ein Umstandswort der Zeit.

M. Butin

Oni gimnastikis nude

schrieb mir dieser Tage ein Jüngling aus Patras und erzählte sehr anschaulich, wie es vor zweitausend Jahren auf den „Olympiakoi Agones" (Olympische Wettkämpfe) in Griechenland zugegangen sei. Nun, ich beanstande keineswegs eine im Rahmen des Schicklichen bleibende Nacktkultur, wohl aber obigen Satz. Man turnt nicht „auf nackte Weise", sondern „in nacktem Zustande", als Nackter, nackt seiend, also nuda. Man kann aber in vorliegendem Fall auch „nudaj" sagen.

„Oni" ist, von Einzelfällen abgesehen, ein Begriff der Mehrzahl, was man hier klar erkennt, denn es turnten und liefen doch viele bei diesen Sportveranstaltungen. — Ein Beispiel Zamenhofs: Oni estas konvinkitaj, ke li pereis.

M. Butin

Enigmo-angulo

I. Kiu scias?

1. Loĝurbo de la gepatroj de Jesuo (germanlingve)
2. multekosta floro
3. malgravaĵo
4. lumilo
5. vivanta fadenfabriko
6. haŭtmalsano
7. senemocia
8. antaŭnomo
9. budhana pastro
10. rodo
11. nutraĵo por bovoj
12. necesa por la vivo
13. sonfortigilo
14. kutima.

Serĉu la vortojn kaj skribu ilin unu sub la alian en la donita sinsekvo. (Atentu: 7, 12 kaj 14 ne estas radikoj. En la solvo ĉe n-ro 7 „st" validas kiel unu litero.)

Vi ricevos proverbon, se vi komencos legi ĉe la komenclitero de la unua vorto malsupren kaj ĉe la finlitero de la sama vorto ankaŭ malsupren.

La vortoj konsistas el jenaj silaboj: a — a — ba — de — di — ek — fon — ga — gen — herb — i — ka — ki — kro — la — lamp — lu — ma — met — mi — na — na — ne — o — ok — or — or — ra — ra — reth — rik — si — sto — tel — uj — ul — za — zem.

II. Kiu scias?

1. Promenboato
2. famo
3. neoksidiĝema metalo
4. nordeŭropa lando
5. gimnaziestro
6. sudamerika lando
7. frostinta akvo
8. soldata vesto
9. juvelŝtono
10. parto de la kapo
11. granda besto
12. lasta ripozejo
13. parto de molekulo
14. universitata instruisto
15. neĝbulego
16. revaĵo
17. semajntago
18. kontraŭstaro.

Faru same kiel ĉi-supre; sed vi bezonos nur la komencliterojn por ricevi alian proverbon.

La silaboj necesaj sekvas laŭ alfabeta vico.

a — an — ar — ar — bo — bri — ci — ci — di — do — dre — e — fan — fe — for — gen — go — gon — ĝen — ĝo — jo — la — le — li — lo — lo — mo — mo — ne — ni — no — nor — o — o — o — o — o — pi — po — pro — pu — re — re — rek — ro — ro — si — so — ta — to — to — to — to — to — to — tom — u — u — uj — van — veg — ven.

H. T.

PARADOX

ist es, wenn Esperantisten ihre Sprachkenntnisse nicht pflegen, verwerten und verbreitern, wozu ihnen die ESPERANTO-POST so manche Anregung bietet. Sind auch Ihre esperantistischen Bekannten bereits Leser und Bezieher der EP?

Manche Leute wissen zwar notdürftig,

was Esperanto ist, doch von den wichtigen Organisationen, insbesondere vom Deutschen Esperanto-Institut, wissen sie oft nur herzlich wenig. Selbst Kursteilnehmer und Gruppenmitglieder werden von Unterrichtsleitern und Vorsitzenden meist nur mangelhaft hierüber informiert. Daher wird immer wieder gefragt:

Welche Aufgaben erfüllt das Deutsche Esperanto-Institut? Nach welchen Grundsätzen werden die Prüfungen durchgeführt? Handelt es sich um eine Vereinsangelegenheit oder sind die Prüfungen offiziell?

Welches Wissen wird verlangt bei den Prüfungen „Pri lingva kapabieco", „Por kurs-gvidantoj" und „Por instruistoj"?

Wie kann man sich auf eine Prüfung vorbereiten?

Wo werden die Prüfungen durchgeführt?

Wie hoch sind die Prüfungs- und Zeugnisgebühren?

Alle diese Fragen und andere werden beantwortet in der neuen Schrift von

Hans Koch, München,
Leiter des Direktoriums des Deutschen Esperanto-Instituts

Das Esperanto-Examen

Preis: 40 + 5 Pf Zustellkosten

ESPERANTO-KURIER (16) Offenbach (Main) Postscheckkonto Ffm. 202 83

Ĉu nia Movado stagnas?

estas daŭrigota en la septembra numero. Ĝi ne trovis lokon pro la multaj kongresraportoj.
Same kelkaj aliaj interesaj kaj gravaj artikoloj.

Redakcio kaj Eldonejo

Werben Sie Bezieher für EP!

Hier ein Bestellzettel, der Ihnen die Arbeit erleichtert. In einen Umschlag stecken mit Drucksachen-Porto!

Ich/Wir bestelle(n) _____ Exemplare der Esperanto-Post

_____ Probenummern (kostenlos)

_____ Vierteljahr (1,50 + 0,12 DM)

_____ Halbjahr (3,— + 0,24 DM)

_____ ein Jahr (6,— + 0,48 DM)

Besteller: _____

Genaue Anschrift: _____

_____

Datum: _____ Unterschrift: _____

Ich beglückwünsche Sie zur Herausgabe des Wörterbuchs Esperanto - Deutsch!

So und ähnlich lauten Zuschriften, die uns täglich erreichen. Haben Sie schon Ihre Bestellung zum Vorbestellpreis von 7,50 DM zuzüglich 70 Pf Versandkosten aufgegeben? Noch ist es Zeit! Alle Bestellungen, die noch den Poststempel vom 30. September tragen, werden zum verbilligten Preis geliefert. Nach diesem Tag kostet dieses gute und ausführliche Wörterbuch 9,- DM zuzüglich 70 Pf für Porto und Verpackung.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Um die Verbreitung des Esperanto auf billiger und leichter Grundlage zu fördern, haben wir einen

Esperanto-Fernlehrgang

eingerichtet. Kostenlose Auskunft über Teilnahme-Bedingungen durch

Esperanto-Gruppe, Bonn
Nordstraße 97

Für die im nahen Herbst beginnenden neuen Kurse

Wir lernen Esperanto

Von Hans und Wilhelm Wingen

Preis 2,— DM, Schlüssel dazu —,80 DM

Niko kaj Nina

Postkursa legolibreto originala

Von Joseph F. Berger / Preis 2,40 DM

Durch alle Buchhandlungen. Zuzüglich 10% für Porto und Verpackung

Verlag der Limburger Vereinsdruckerei · Limburg/Lahn

Unsere Anzeigenpreise!

Zeilenpreis	20 Pf
Für Kleinanzeigen Worttarif:	
Korrespondenz-, Familien- und andere Anzeigen	je Wort 10 Pf
Fettdruck	je Wort 20 Pf
Geschäftliche Kleinanzeigen	je Wort 20 Pf
Fettdruck	je Wort 30 Pf

Dieser niedrige Tarif ermöglicht es jedem, seine Wünsche in Anzeigenform zu veröffentlichen.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.